# MUZIKA TERMINARO

**M. C. BUTLER kaj F. MERRICK**

Dua eldono

Represo de la unua eldono kun permeso de
Universala Esperanto Asocio

1960

Eldonita de
ESPERANTO PRESS
Oakville, Ontario, Kanado

# MUZIKA TERMINARO

**M. C. BUTLER kaj F. MERRICK**

Dua eldono

Represo de la unua eldono kun permeso de
Universala Esperanto Asocio

1960

Eldonita de
ESPERANTO PRESS
Oakville, Ontario, Kanado

## TABELO DE ENHAVO


| | Paĝo |
|---|---|
| Antaŭparolo | 3 |
| Akustiko | 4 |
| Notacio— | |
| Sistemoj. Piĉnomoj. Daŭronomoj. Kromsignoj | 6 |
| *Maĵora, Minora* | 7 |
| Intervaloj. Plen- kaj duondutoj | 7 |
| Tonaleco. *Gamo*— | |
| Skalnotoj, Skaloj, Tonaloj, Modaloj kaj Submodaloj, Moduladо | 8 |
| Ritmo— | |
| Taktoj (simplaj kaj malsimplaj), Grupoj neregulaj | 11 |
| Melodio— | |
| Ornamaĵoj | 12 |
| Harmonio— | |
| Akordoj (Nomado, pozicioj, nomoj apartaj) | 13 |
| Kadencoj | 15 |
| Disonancoj. Suspendoj | 15 |
| Movo de voĉoj | 16 |
| Persistoj kaj Ripetoj | 16 |
| Kromnotoj | 17 |
| Kontrapunkto— | |
| Kanono, Fugo | 17 |
| Muzikospecoj | 19 |
| Muziko Plurartista | 19 |
| Formo. Klasado— | |
| Formoj Sonata, Rondela, Sonatrondela | 20 |
| Muziko Religia, Voĉa, Instrumenta, Danca, Teatra | 21 |
| Instrumentoj— | |
| Kordaj, Blovaj, Perkutaj, Okazaj, Meĥanikaj | 23 |
| Dampado | 28 |
| Instrumentopartoj— | |
| Kordinstrumentoj. Piano. Blovinstrumentoj. Anĉoj. Orgeno. Tamburo. Gramofono. Sona konservo kaj reprodukto | 29 |
| Akcesoraĵoj | 32 |
| Instrurimedoj | 32 |
| Terminoj Diversaj— | |
| Voĉdresado | 32 |
| Orkestro, Ĥoro | 33 |
| Interpreto, Tekniko | 33 |
| Komponado | 34 |
| Vortoj Italaj | 34 |
| Mallongigoj | 35 |




## MUZIKA TERMINARO

En ĉiu lingvo la muzika terminaro estas en stato ĥaosa. Ofte unu termino havas multajn signifojn; unu afero multajn nomojn; terminoj kaj signifoj varias laŭ dato kaj aŭtoro kaj lingvo.

Terminaro Esperanta devas kompromisi inter la kontraŭaj postuloj de logiko kaj internacieco. Nek unu nek alia estas plene kontentigebla. Ni celis racian mezvojon, kaj libere proponis sinonimojn klarigajn aŭ alternativajn.

Por ŝpari spacon, ni donis ilustrajon, difinon, aŭ tradukon (Anglan, aŭ en unu aŭ pluraj el la lingvoj Franca, Itala, Germana), nur se tio ŝajnis necesa por klareco. Samkaŭze ni ĝenerale ellasis ĉion antikvan, ne-Eŭropan, aŭ pure lokan.

Radikojn signitajn per * ni mem proponis. Ĉe unu-du radikoj (ekz., **klef, skal, tamtam, temp**) ni ne sekvis aliajn vortarojn.

Ni konsultis la skizan *Muzika Terminaro* de *de Ménil* (1908), la nefinitan terminaron de *Schafer* (1910), kaj multe da aŭtoritatoj diverslingvaj. Per konstanta konsulto ni danke ricevis kompetentan helpon de S-roj H. C. Allen, W. M. Appleby, E. D. Durrant, B. E. Long, T. Pendlebury, E. F. Relf, kaj L. Waite, kiuj tamen neniel respondas pri difektoj de la verko. Ni invitas proponojn por plibonigo de eventuala noveldono.

Pri ni mem. Ni estas muzikistoj profesiaj: unu, Licenciato de la Reĝa Akademio de Muziko en Londono; la alia, Fratulo kaj Profesoro de la Reĝa Kolegio de Muziko en Londono, kaj konata virtuoza pianisto ĉe la B.B.C. kaj aliloke.

MONTAGU C. BUTLER
FRANK MERRICK

## AKUSTIKO

**Sono** rezultas el **vibrado.** Kontraste kun **bruo,** ĉe **sono muzika** la vibrado estas **regula.** Sonondoj varias laŭ **frekvenco** (**vibrorapido**), **amplitudo,** kaj **formo.**

La vortoj **sono, tono, noto,** uziĝas preskaŭ sinonime, tamen kun nuanco de diferenco laŭ vidpunkto kaj kunteksto. Ĝustadire, **tono**=muzika sono kun difinita alto ; **noto** estas skribita signo, kiu prezentas muzikan sonon. Tamen (same kiel *vorto* povas esti skribata aŭ parolata) **noto** povas figure signifi ankaŭ la sonon mem, ludatan aŭ kantatan. **Sono** propre rilatas aŭdeblecon, orelon ; **tono** sonalton ; **noto** signon, okulon, teorion.

Internacie, la radiko "ton" estas tre malpreciza. En AFG ĝi havas inter 7 kaj 10 el la 12 signifoj *sono, tembro, nuanco, intervalo, plejnkanto, toniko, tonalo, modalo, sonalto, skalo, kromtubo, tonforko.* Pro tio, ke en ĉiu Eŭropa lingvo **ton**= (a) muzika sono, (b) intervalo(plenduto), oni ne povas rifuzi **al** ĝi almenaŭ tiujn du signifojn. Tamen, por klareco, ni konsilas uzi prefere por (a) **sono, tono, noto** (laŭnuance), kaj por (b) **plenduto** aŭ **plentono,** sed ne simpla **tono.**

La **intenso** (**forto, laŭto**) de sono dependas ĝenerale de la amplitudo de la vibroj : ĝia **alto,** de ilia frekvenco. Ju pli rapida la vibrado, des pli alta la sono.

La alto de sono estas konsiderebla kiel (a) **absoluta** (responda al difinita vibrorapido), aŭ (b) **rilata** (al alia sono).

***Piĉo**=absoluta sonalto (de tono, skalo, instrumento, aŭ voĉo). Ekz., **Altpiĉa piano.** Klarnetoj estas **diverspiĉaj** (B♭, A, C, E♭), **Levi la piĉon** : plialtigi ĉiujn tonojn po sama intervaleto. Ĉe instrumentoj malsampiĉaj A ne estas absolute samalta.

**Piĉoktoj** (de plej malalta ĝis plej alta) nomiĝas per multaj sistemoj konfuzaj kaj interkonfliktaj. Ĉiuokaze, oni povas sin orienti per la tri kleflinioj. C de la C-klefo nomiĝas **meza C.**

Laŭ la **piĉnormo** ĝenerale akceptita, 440 vibroj sekunde faras la tonon A super meza C : alivorte, 440 estas la **frekvenco** (**vibronombro**) de tiu A.

La intervalo inter la sonoj plej malalta kaj plej alta de instrumento aŭ voĉo estas ĝia **amplekso.**

**Registro**=la sonamplekso de instrumento aŭ voĉo rilate al ĝia piĉo. Ekz., **registro tenora, harpa, okfuta** (ĉe orgeno). Du



voĉoj malsamregistraj (ekz., basa kaj soprana) povas havi saman **amplekson** (ekz., duoktan).

**Tono simpla** (**pura**) konsistas el unuopa vibrado. Plejofte tono estas **malsimpla,** t.e., ĝi konsistas el ĉefa vibrado kun aliaj kunvibradoj pli malfortaj kaj de oblaj frekvencoj : kun la **fundamento** (**fundamenta tono**) (la ĉefa vibrado) sonas **kromtonoj** (ĝia okto, 12to, 15to . . . ). Tio estas la **Harmona Serio.** Ĉiu tono en la serio (inkluzive de la fundamento) estas **sonero** (=sonparto, *partial*). Ĉiu sonero super la fundamento estas **supertono** (*upper partial, Oberton*) aŭ **harmono.** La okto estas do la **dua sonero,** sed la **unua supertono** (**harmono**) de tono malsimpla.† Harmono estas tono simpla.

La **kvalito** de tono dependas de la nombro, konsisto, kaj relativa intenso, de ĝiaj harmonoj. La karakteriza kvalito de tono aŭ instrumento estas ĝia **tembro.**

Kiam kunsonas du tonoj (nomeblaj **generantoj**), produktiĝas ankaŭ kromtonoj alispecaj, kies frekvencoj estas respektive (a) la diferenco inter— kaj (b) la sumo de— la frekvencoj de la generantoj. Tiuj "triaj tonoj" estas **kombinotonoj** (**rezultantoj**). Ili nomiĝas (a) **subtono** (**diferencotono**) kaj (b) **sumtono.**

Kiam kunsonas du tonoj preskaŭ samaltaj, la sonfluon interrompas (son)**batoj** (regulaj pulsadoj aŭ alternadoj de intenso), pro la **interfero** (alterna (ne)koincido) de la du frekvencoj.

**Disonanco**=la malagrabla efekto de sonbatoj. La **akreco** de disonanco dependas de piĉo kaj sonbata rapido. **Konsonanco**= la agrabla efekto de sonkombino sen rimarkebla disonanco. Intervalo aŭ akordo konsonanca estas nomebla **konkordo.**

Vibrantaĵo povas komuniki sian vibron al alio, antaŭe senvibra. Tiu fenomeno estas * **resonanco** (**simpatia kunvibrado**).

La **vibra *ratio** (*ratio*) de intervalo estas la proporcia rilato inter la frekvencoj de ĝiaj tonoj. Ekz., la vibroratio de * **komo** estas 81/80 ; de okto 2/1.

---

† Jen konata diferenco de uzado. Laŭ la sciencisto **harmono**=**sonero,** kaj **la tria harmono**=la tono kun frekvenco trioble tiun de la fundamento=la dua **supertono.** Laŭ la muzikisto **harmono**=**supertono,** kaj la **tria harmono**=**la tria supertono.**

Ekzistas diferenceto inter **harmono** kaj **supertono.** Harmono estas membro de la **harmona** serio ; ĝia frekvenco oblas la fundamentan. Sed kelkaj instrumentoj (ekz., sonorilo) produktas supertonojn, kies **frekvencoj ne precize** oblas **la fundamentan.** Do kvankam harmono estas **supertono, ne ĉiu supertono estas harmono.**

Oni povas agordi pianon laŭ diversaj **sistemoj**. Agordo **ĝusta** (*just*) en unu tonalo kondukus al malfacilaĵoj (ekz., **kvintaĉo** aŭ **"lupo"**) en tonalo malproksima. Oni do faras **kompromison** inter akustika ĝusteco kaj praktikaj bezonoj, **nomitan** ***temperado**. Antaŭe oni uzis temperadon **mezan** (***mean-tone***); nuntempe **egalan** (*equal*), ĉe kiu oni intence iom misagordas ĉiun tonalon egale. La vibroratio de **kvinto ĝusta** estas 3/2; de **kvinto egala** (=egale temperita) proksimume 433/289.

Ŝanĝo de liternomo (ekz., C♭–B) estas ŝanĝo **enharmona**, kaj tia ĝustagorda intervalo estas intervalo enharmona.

## NOTACIOJ (Sistemoj de Notskribo)

La universala * **notacio** estas la **liniara**. Ĝi prezentas tonojn *absolutajn*. La notoj staras sur **linioj** aŭ en **spacoj** de **liniaro** kutime 5-linia. La **Granda Liniaro** havas 11 liniojn. Laŭbezone oni aldonas **linietojn** (**kromliniojn**) suplementajn. Komence de liniaro * **klefo** difinas la nomon de la linio koncernata. Ekzistas **F-klefo** (**basklefo**), **C-klefo**, kaj **G-klefo**.

Du aliaj notacioj (ne rivalaj, sed suplementaj, al la liniara) prezentas tonojn ne absolutajn, sed *laŭ ilia rilato inter si*. Ili estas (a) la **Cifera** (*Galin–Paris–Chevé*) de landoj Franclingvaj, kaj (b) la Silaba aŭ * **Solfaa** (*Tonic Sol-fa, Tonika Do*) de landoj Anglalingvaj.

### TONOJ ABSOLUTAJ. PIĈNOMOJ

La tonoj faritaj per la blankaj pianoklavoj nomiĝas Esperante kiel Angle: **A, B, C, D, E, F, G**. Prononcu Esperante: *A, Bo, Co* . . . Simpla G=**G natura**.

### DAŬRONOMOJ

𝅜 Duobla noto (Duoblo) 𝅗𝅥 Duona noto (Duono)

𝅝 Plena noto (Pleno) ♪ Okona noto (Okono)

♩. ♩.. Kvaronoj punktita, dupunktita

La nomoj de la silentoj estas konformaj.

𝄻 Plen(not)a silento 𝄾 Okonsilento.

𝅘𝅥𝅯 Dek-sesono, kun nigra kapo, tigo, kaj du vostoj.

Ĉe ♪ 𝅘𝅥𝅯𝅘𝅥𝅯 la vostoj estas liberaj; ĉe ♫ ligitaj.





Oni trovas la nomojn **dieso** (♯); **dudieso** (x, ♯♯); **bemolo** (♭), **dubemolo** (♭♭). Ni proponas jenajn alternativojn, kompromisojn inter formoj Germanaj kaj Francaj:

♯=* **is**; x=**isis**; ♭=* **be**; ♭♭=**bebe**. La nomon G♯ oni legas **G is** (pr. *Go is*). Simile: Gx=**G isis**; G♭=**G be**; G♭♭=**G bebe**. Oni do parolos pri **isoj** kaj **beoj**; **isgamoj** kaj **begamoj**; **isigo** aŭ **beigo** de noto.

La signo ♮=**naturigilo** (**nuligilo**).

## LA VORTOJ MAĴORA, MINORA

En Esperanto, kiel en AFI, oni uzas **maĵora-minora** por tonaloj, skaloj, kaj intervaloj, egale. Ĉe skalo **maĵora** (**minora**) la medianto faras kun la toniko triton **maĵoran** (**minoran**).

Tamen, se oni volas, oni povas uzi **granda-malgranda** por intervaloj, kaj rezervi **maĵora-minora** por tonaloj kaj skaloj, laŭ la sistemo Germana.

## INTERVALOJ

**Intervalo**=la diferenco de alto inter du tonoj. Ni rekomendas la serion * **unuto**, * **duto**, * **trito**, **kvarto**, **kvinto**, **sesto**, * **septo**, * **okto**, * **naŭto**, * **dekto**, **dek-unuto**, **dek-duto** . . .

Laŭvole, oni povas uzi alternative kaj eĉ prefere **oktavo** (=okto) kaj eble eĉ * **terco** (ne **tercio**) (=trito), pro ilia internacieco. Anstataŭ **dek-duto** oni povus ankaŭ diri **kvintokto** (=okto super la kvinto), k.s.

Kanti **unute**=kanti samsone: kanti **unisone**=kanti unute, okte, aŭ plurokte. Rim: Unuto (tona koincido) ne estas intervalo vera.

**Intervalo melodia**=inter notoj sinsekvaj. **Intervalo simpla**=okto, aŭ i. malpli granda ol okto: **i. kunmetita**=i. pli granda ol okto.

Oni uzas la terminojn **perfekta, maĵora** (**granda**); **minora** (**malgranda**), kun la kutima signifo. Pli granda ol perfekta aŭ maĵora=**maksimuma** (**pliigita**). Malpli granda ol perfekta aŭ minora=**minimuma** (**malpliigita**).†

† Propono **maksima, minima** (kp. Fr. *tierce maxime*)—aŭ anst. **maksimuma, minimuma**; aŭ alternative, kiel formoj pli oportunaj, aparte ĉe kunmetaĵo (same kiel kemie oni uzas **sulf-, fosf-**)—elvokis ĉe unuj fortan kontraŭstaron, ĉe aliaj insistan subtenon. Ni ĝin notas sen esprimo de opinio.

Intervalo estas **invertebla** (**renversebla**) : kvarto invertita = kvinto. * **Inverti** = meti subon supre.

**Plenduto** ( = (whole) tone) priskribas la intervalon laŭ vidpunkto sona. **Majora duto,** laŭ vidpunkto notacia. Simile : **kvaronduto** (*quartertone*) ; **duonduto** (*semitone*) ; **triduto** (*tritone*). Oni povas ankaŭ diri alternative **plentono, kvarontono, duontono, tritono.‡**

PLENDUTOJ (*TONES*)

**Granda p.** (*Greater Step, Major ("Wide") Tone* = 9/8 (d-r).
**Egala p.** (*Equal tone*) = proks. 449/400 (plenduto piana).
**Malgranda p.** (*Smaller Step, Minor Tone*) = 10/9 (r-m).

DUONDUTOJ (*SEMITONES*)

**Diatona d.** (*Diatonic s.*) = 16/15 (m-f).
**Granda kromata d.** (*Greater chromatic s.*) = 135/128 (f-fe).
**Egala d.** (*Equal s.*) = 89/84 (duonduto piana).
**Malgranda kromata d.** (*Smaller chromatic s.*) = 25/24 (s-se).

## LA VORTOJ **SKALO, TONALO, MODALO, GAMO**

Por la ideo "sonŝtuparo, serio da notoj laŭ regula alfabeta ordo" (*scale/échelle, gamme/scala, gamma/Skala, Tonleiter*/H. kaj Port. *escala*) ni proponas * **skalo.**

Por la ideo "skalo, akordoj, kaj tonrilatoj grupiĝantaj ĉirkaŭ toniko" (*key/mode, ton/modo, tono/Tonart*) ni proponas * **tonalo.** Internaciaj derivajoj : **tonala, tonaleco** (*tonal, tonality*).

Por la ideo *mode/ton d'église/tuono ecclesiastico/Tongattung* (vidu sube) ni proponas * **modalo.** Internaciaj derivajoj : **modala, modaleco** (*modal, modality*).

Internacie gam = (interalie) (a) skalo, (b) tonalo. Literature kaj ĝenerale estas oportune doni al **gamo** tiun vastan signifon : **skalo + tonalo.** Figure, ĝi povas ankaŭ signifi A *gamut* ; la tutan amplekson de la muzika sonaro. Sed por la precizaj ideoj *scale/Tonleiter ; key/Tonart ; mode/Tongattung*, oni uzu prefere **skalo, tonalo, modalo.**

SKALNOTOJ

La ĉefa (reganta) noto de la skalo estas la **toniko** (gamnoto). Super ĝi staras la **supertoniko, medianto, subdominanto, dominanto, submedianto, kondukanto.** Nomoj internaciaj, sed

‡ La terminoj **plenduto, duonduto** (aŭ **plentono, duontono**) ŝajnas iom longaj. La simpla vorto **tono** (sen kvalifiko) estas dusignifa. Oni povus uzi **grado, duongrado** ; sed internacie *grado, degree* = skalnoto, skalŝtupo, ne intervalo. **Paŝo** estas malpreciza. Ni ne trovis pli bonan solvon.



iom nekonsekvencaj (*supertoniko* = noto super la toniko : *submedianto* = suba medianto).

Oni povas nomi ilin la **unua (dua, tria . . . ) noto** (aŭ **ŝtupo**) de la skalo.

Ili povus nomiĝi ankaŭ **gamnoto, gamduto, gamtrito . . .**

Cifere, *ĉe skalo majora,* oni nomas ilin **1, 2, 3, 4, 5, 6, 7.**

Solfae, oni uzas la nomojn **doh, ray, me, fah, soh, lah, te** (pr. *do, re, mi, fa, so, la, ti*) kaj skribas ilin **d, r, m, f, s, l, t** (ne konfuzu kun similaj nomoj de absoluta piĉo en F1). Isformoj : **de, re, fe, se, le** (pr. *di, ri* . . . ) Beformoj : **ra, ma, la, ta** (pr. *rɔ, mɔ,* . . . : "ɔ" laŭ la Int. Fonetika Alfabeto).

SKALOJ

La **kromsignoj** (isaro, bearo) komence de liniaro estas la **gamsigno** (tonalsigno).

**Diatona** = **laŭgamsigna. Kromata** = nediatona. Kromata noto tamen restas en la tonalo : ĝi estas kvazaŭ nuanco, kolorita formo de la diatona.

**Skalo majora** havas la dutaranĝon 1 1 ½ 1 1 1 ½. (Pli precize : la intervaloj havas proksimume la proporcion 9 8 5 9 8 9 5). La du similaj duonoj (drmf-sltd') nomiĝas **tetrakordoj.**

Ĉe **skalo minora,** solfae, la toniko estas *lah* (1) (vidu sube : modaloj). Skalo minora havas du ĉefajn formojn : (a) **harmonia** kun levita sepa noto (l, t, d r m f se l), (b) **melodia** (kun 6a kaj 7a notoj levitaj suprenire, sed naturaj ( = laŭ la gamsigno) malsuprenire) (. . . m ba se l s f m . . .). La levitaj 6a kaj 7a notoj estas rigardataj kiel diatonaj, egale kun la naturaj.

Ekzistas multaj aliaj skaloj. Ekz., la **kvinnota** (*pentatonic*) (d r m s l d') ; kaj la **Cigana** aŭ **Hungara** (l, t, d re m f se l).

La ordinara **skalo kromata** (**duonduta**) konsistas el 12 duondutoj.

Skaloj kun intervaloj **egalaj** (egale temperitaj) estas la **skalo 12-nota** (*dodecuple*) kaj la **skalo 6-nota** (**plenduta**) (*whole-tone*). Ili estas **sentonikaj,** sekve **netonalaj** (*atonal*).

Skalo el 12 duondutoj povas do esti aŭ tonala (kromata) aŭ netonala (12-nota).

TONALOJ

Tonalo nomiĝas **majora** aŭ **minora** ( = laŭ maj. aŭ min. skalo). Oni parolas, ekzemple, pri la tonalo A♭ (pr. *A be*) **majora. F♯** (pr. *Fo is*) **minora.**

C maj. kaj C min. estas **samtonikaj.** C maĵ. kaj A min. estas **parencaj** (*relative*) : samgamsignaj sed malsamtonikaj.

Tonaloj **proksimaj** (*related, attendant*) estas kvin : la **parenca maĵoro** (aŭ **minoro**) ; la parencaj maĵ. kaj min. de la **unua gam(sign)o bemolflanka** kaj de la **unua gam(sign)o isflanka.**

Aliaj tonaloj estas pli-malpli **malproksimaj.**

### MODALOJ

Ludante iujn ajn ok sinsekvajn blankajn pianoklavojn, oni ricevas serion de notoj en la tonalo C. La sep serioj aŭ skaloj tiel ricevitaj diferencas laŭ aranĝo de plendutoj kaj duondutoj. Ĉiu tonalaspekto tiel prezentita nomiĝas **modalo.**

La ĉefnoto de ĉiu modalo estas ĝia **toniko** (*"final"*). Laŭ la tonalo C :

| | | | |
|---|---|---|---|
| C–C′ = | **Modalo Iona** | (d–d′ | = DOH–modalo) |
| D–D′ = | ,, **Dora** | (r–r′ | = RAY–modalo) |
| E–E′ = | ,, **Friga** | (m–m′ | = ME–modalo) |
| F–F′ = | ,, **Lida** | (f–f′ | = FAH–modalo) |
| G–G′ = | ,, **Mezlida** | (s–s′ | = SOH–modalo) |
| A–A′ = | ,, **Eola** | (l–l′ | = LAH–modalo) |
| B–B′ = | ,, **Lokra** | (t–t′ | = TE–modalo) |

La supraj estas modaloj **aŭtentaj.** Oni ja povus nomi ilin la Modaloj Unua (Dua, Tria . . . ) ; tamen ortodokse ili nomiĝas la XI, Ia, IIIa . . .

Ĉe **submodaloj** (**modaloj plagalaj**), ekz., la **subdora** (*hypodorian*), la melodio pli-malpli limiĝas interdominante, anst. intertonike.

Ĉe muziko eklezia kaj folklora la modaloj ludas gravan rolon. Aliloke, pro la influo de harmonio, ili preskaŭ formortis. Sed el la modaloj Iona kaj Eola fontis la **modernaj "Maĵora Modalo"** (Doh-modalo) kaj **"Minora Modalo"** (Lah-modalo) respektive (mallonge : la **maĵoro** kaj **minoro modernaj**). Rim : Ankaŭ la Dora modalo estas modalo minora, kaj la Lida modalo maĵora.

La skaloj G A B C D E F♯ G kaj E F♯ G A B C D E ambaŭ laŭas la G-gamsignon, sed nomiĝas respektive G maĵora kaj E minora, ĉar iliaj tonikoj estas respektive G kaj E. Ili estas maĵoro kaj minoro parencaj ; laŭ unu vidpunkto nur du el la modaloj de la gamo G.



## MODULADO

Transiro de unu tonalo aŭ modalo al alia nomiĝas **modulado** (**gamŝanĝo**). Pli precize, oni diras **ŝanĝo de tonalo** (aŭ **de modalo**). Oni diras, ke la muziko **moduliĝas**=**ŝanĝas gamon** (**tonalon** aŭ **modalon**).

Modulaĵo povas esti **abrupta** (**subita**) aŭ **grada** ; **momenta** aŭ **longe-daŭra** ; **diatona, kromata, enharmona.**

***Transponi** (**aligamigi, alipiĉigi**) muzikon=ĝin trans-skribi (-ludi, -kanti) pli (aŭ malpli) alten, en alian tonalon.

## RITMO

**Tempo** (vorto komunlingva) malprecize rilatas al daŭro.

**Ritmo** malprecize=la tempa flanko de muziko, kontraste **kun** la flanko sonalta. Ĝi rilatas al pulsoj, notoj, silentoj, akcentoj, mezuroj, k.s., kaj ties grupiĝoj.

**Daŭro**=templongeco (de noto aŭ silento).

**Rapido**=grado de movrapideco (metronome difinebla).

**"Laŭ la unua rapido"** : *"Tempo primo."*

**Mezuro** (*measure, bar*)=daŭr-unuo : de unu ĉefpulso aŭ takto-streko ĝis la proksima.

**Pulso** (*pulse, beat*)=ero de mezuro.

**Takto** (*time*)=nombro kaj valoro de pulsoj en mezuro. La **taktosigno** indikas la takton per du ciferoj : la supra diras la nombron de pulsoj ; la suba, ilian daŭron. Ĉe $\frac{3}{4}$ ĉiu mezuro havas tri pulsojn, kies daŭro estas po unu kvarono. Oni povas paroli pri **takto de valso** (**de marŝo**).

**Taktostreko**=vertikala streko tra liniaro. Ĝi montras la finon de unu mezuro kaj la komencon de la proksima. **Duobla streko** montras la finon de peco aŭ sekcio.

**Akcento**=la relativa forto (emfazo) de difinita pulso aŭ noto. La unua pulso de mezuro (kaj de noto sur tiu pulso) estas nature **forta** (**akcentita**). Oni nomas ĝin la **ĉefa pulso.** Aliaj pulsoj estas **mezfortaj** aŭ **malfortaj** (havas akcenton mezfortan aŭ malfortan). Solfae oni signas la pulsojn jene :

| =forta  |. =mezforta  : =malforta

***Sinkopado**=akcento kontraŭtakta (nenormala) : intenca misloko de la regula akcento.

TAKTOJ SIMPLAJ

| | *Akcentformulo de mezuro* |
|---|---|
| **Dupulsa** (2/2, 2/4, 2/8) | \| : |
| **Tripulsa** (3/2, 3/4, 3/8) | \| : : |
| **Kvarpulsa** (4/2, 4/4, 4/8) | \| : ׀ : |

TAKTOJ MALSIMPLAJ

| | |
|---|---|
| **Sespulsa** (6/4, 6/8, 6/16) | \| : : ׀ : : |
| **Naŭpulsa** (9/4, 9/8, 9/16) | \| : : ׀ : : ׀ : : |
| **12-pulsa** (12/4, 12/8, 12/16) | \| : : ׀ : : ׀ : : ׀ : : |

Troviĝas ankaŭ taktoj pli maloftaj : **kvinpulsa, seppulsa,** k.a.

6–, 9–, kaj 12-pulsaj taktoj estas **malsimplaj** formoj de 2–, 3–, kaj 4-pulsaj taktoj respektive : ĉe ili unu pulso de simpla takto fariĝas tripulsa.

Interparole, anst. **tripulsa takto** oni povas diri **tri-takto** ; 6/8 oni povas nomi **ses-ok-takto,** aŭ **sesokona takto** ; aŭ **malsimpla du-takto.** Kaj simile ĉe aliaj taktoj.




Jen du mezuroj da melodio laŭ tripulsa takto, t.e., ĉiu mezuro estas tripulsa (enhavas tri pulsojn) : ĉiu pulso havas daŭron de kvarono. La vorto *Presto* montras, ke la movo estas rapida : la precizan rapidon montras la metronoma cifero 180. Oni povas diri, ke la melodio estas valstakta. Ĝi komenciĝas je la tria pulso de la unua mezuro. La noto E♭ (d'), staranta tuj post la streko, estas ĉefpulsa ; do havas pli fortan akcenton ol la aliaj. ¾ estas la taktosigno. La tri-bea gamsigno montras, ke la muziko estas en **E♭** (laŭ la tonalo E♭).

GRUPOJ NEREGULAJ

**Duolo** (*duplet/duole*) = 2 notoj en tempo de 3 samspecaj.
**Triolo** (3 = 2). **Kvarolo** (4 = 3 aŭ 6). Aliaj simile.

## MELODIO

**Melodio.** (a) (kontraste kun *harmonio*). Plaĉa sinsekvo de individuaj tonoj. (b) Difinita ario, kanto (*air, tune*). La **iro** (movo) de unu noto al alia povas esti **paŝa** aŭ **salta** (**per paŝo, per salto**).



**Ario.** (a) Kantmelodio (= *melodio*(*b*) supre). (b) Muzika formo : triera kanto kun teksto dufraza.

**Frazo (muzika).** Muzika penso, melodia ideo, kompleta en si.

**Pasaĵo.** Malgranda parto (fragmento) de muzikaĵo.

**Rulado** (*run*). Skala pasaĵo rapida.

**Koloraturo.** (a) Ruladoj, triloj, kaj similaj ornamaĵoj. (b) Pasaĵo tiustila.

**Figuro.** (a) Temero : aparta aŭ signifa notgrupo melodia aŭ ritma. (b) Formo de akompanaĵo. Oni parolas pri **Alberti-baso** kaj **Rompitaj oktoj (akordoj).**

***Motiŭo.** Eta pasaĵo, figuro, temero, el kiu konstruiĝas temo pli granda, aŭ kiu havas apartan signifon en si.

**Tema ellaboro.** (*Thematic development*).

ORNAMAĴOJ

| | | | |
|---|---|---|---|
| 𝆔 | Apoĝaturo (vd. p. 33) | | |
| 𝆕 | *Acakaturo | | |
| 𝆖 | *Mordento supra | 𝆗 | Mordento suba |
| 𝆘 | Mordento doubla | | |
| *tr* | Trilo | | |
| ∞ | Turno (normala) | ∽ aŭ ∞ | Turno invertita |

## HARMONIO

**Akordo.** Kombino de notoj, konsonanca aŭ disonanca.

***Triado (kvintakordo).** Akordo trinota, konsistanta el **radiko** (noto baza aŭ fundamenta) kun trito kaj kvinto supre. Jen kelkaj triadoj en D majora : la suba noto estas la radiko.



1, 4, 5, 11–14 estas akordoj **majoraj**; 2, 3, 6 estas akordoj **minoraj**.

1–7 estas akordoj **diatonaj** (**laŭgamaj**). 8–14 estas (en D majora) akordoj **kromataj**.

7–9 estas **minimumaj triadoj** (**akordoj de la minimuma kvinto**). 10 estas **maksimuma triado** (**akordo de la maksimuma kvinto**).

Radiko kaj kvinto sen trito estas **kvinto neplena**.

AKORDNOMADO

Akordoj nomiĝas laŭ la skalnomo de la radiko. Diverssisteme 1–7 nomiĝas (a) Akordoj **tonika, supertonika, medianta . . . ;** (b) Akordoj **gamnota, gamduta, gamtrita . . . ;** (c) Akordoj **I, II, III**; (d) (Majore): Akordoj **D, R, M, F, S, L, T** (majuskloj).

1, 4, 5 (tonika, subdominanta, dominanta) (I, IV, V) (D, F, S) estas akordoj **ĉefaj**.

Oni povas ankaŭ indiki akordon **per ciferita baso** (vidu 15–32).

Unua inverto de triado (6/3) estas nomebla ankaŭ **ses-tri-akordo**, dua inverto (6/4) **ses-kvar-akordo**. Simile: **ses-kvin-akordo, ses-kvar-du-akordo,** k.s.

6/3 estas mallongigeblaj ĝis 6; 7/5/3 ĝis 7, k.s. La ellasitaj ciferoj estas ciferoj **implicitaj**.

POZICIOJ DE AKORDOJ

Se la radiko de triado k.t.p. staras sube, la akordo estas en la **radika** (**unua** aŭ **a**) pozicio (1–14, 15, 18).

Se alia noto staras sube, la akordo estas **invertita**.

Se la trito staras sube, tio estas la **unua inverto**: la akordo estas en la **dua** (aŭ **b**) **pozicio** (16, 19).

Se la kvinto staras sube, tio estas la **dua inverto**: la akordo estas en la **tria** (aŭ **c**) **pozicio** (17, 20). K.s.

15 16 17 18 19 20 21



| | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 | 21 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| *Ciferita* | (5) | 6 | 6 | 7 | 6 | 4 | 4 |
| *Baso:* | (3) | | 4 | | 5 | 3 | 2 |
| *Solfae:* | D(a) | Db | Dc | ⁷S(a) | ⁷Sb | ⁷Sc | ⁷Sd |



Diatona triado kun aldonita septo estas **septakordo**; kun aldonita naŭto, **naŭtakordo**. Simile troviĝas **akordoj dek-unuta** kaj **dek-trita**.

22 23 24 25 26 27 28 29 30 31 32




| 22 | 23 | 24 | 25 | 26 | 27 | 28 | 29 | 30 | 31 | 32 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 7 | 7 | 7 | 7 | 7 | 7 | 7 | 9 7 | ♭9 7 | 7 | ♭7 |
| ⁷D | ⁷R | ⁷M | ⁷F | ⁷S | ⁷L | ⁷T | ⁹⁷S | ˡᵃ⁷S | ⁷SE | ˡᵃT |

22–28 = **septakordoj diatonaj** (Solfae legu *Sep Do* . . . ).
26 = **Dominanta septakordo.** 29 = **Dominanta naŭtakordo.**
30 = **Minora naŭtakordo.** 31, 32 = **Akordoj de la Minimuma Septo.**

AKORDOJ KUN NOMO APARTA

La **Akordo de la Maksimuma Sesto** havas tri formojn: 33, **Itala Sest(akord)o**; 34, **Franca Sesto**; 34, **Germana Sesto.**
36 = **Aldonita Sesto**; 37 = **Napola Sesto.**

33 34 35 36 37



**Pikardia Trito** = majora tonikakordo fine de minora muzikajo.

KADENCOJ

**Kadenco** = du akordoj, kvazaŭ muzika punkto aŭ komo, kiuj kutime signas la finon de frazo aŭ sekcio. Ekz.,

**Kadenco Perfekta** (**Plenfina**) = V (aŭ ⁷V) I (S(aŭ ⁷S)D).
**Kadenco Plagala** (**Amena**) = IV I (F–D).
**Kadenco Dominanta** (**Duonfina**) = V (S) post alia akordo.
**Kadenco Interrompita** (**Surpriza**) = V aŭ ⁷V (S aŭ ⁷S) sekvata de iu ajn akordo alia ol I(D). Ekz., V VI (S L).

DISONANCOJ (PREPARO—FRAPO—SOLVO)

Se disonanca noto jam sonis konsonance kaj samvoĉe en la antaŭa akordo, ĝi estas **horizontale preparita.** La paso de disonanco al konsonanco estas ĝia **solvo.** La solvo povas esti **suprena,** aŭ (pli ofte) **malsuprena.** La disonanco kaj ĝia solvo estas **transdoneblaj** al alia voĉo.

***Suspendo** (**reteno**) estas solvo **prokrastita.** Se du(tri) notoj estas suspendataj kune, la suspendo estas **duopa** (**triopa**).

Unu aŭ pluraj notoj de akordo povas soni **anticipe** (=**antaŭ ŝanĝo** de la cetera harmonio).

MOVO DE VOĈOJ

**Voĉo, parto.** Muziko por unu voĉo aŭ instrumento **el aro.** Ekzemple: "Fugo por tri voĉoj": "la soprana (fluta . . .) parto".

La plej alta kaj la plej malalta voĉoj nomiĝas **eksteraj**: (ĉe 4-voĉa muziko **la soprano** kaj la baso). La ceteraj estas **internaj (mezaj).**

Harmonio povas esti **kompakta** aŭ **etendita** (t.e., la voĉoj—aparte la supraj—staras **kune** aŭ **dise**).

La movo de du voĉoj rilate unu al la alia povas esti (a) **paralela** (ambaŭ (mal)leviĝas kune kaj samintervale); (b) **simila**; (c) **oblikva** (unu restas senmova, la alia iras (mal)supren); (d) **kontraŭa.**

**Pretersalto.** Suba voĉo supreniras al noto pli alta, ol tiu de pli alta voĉo en la antaŭa akordo (aŭ inverse, malsuprenire).

**Kruciĝo.** Suba voĉo fariĝas supra (kaj inverse !).

**Interŝanĝo.** Ĉiu voĉo prenas la noton de la alia.

Ĝenerale evitendaj estas (a) **Kvintoj** aŭ **Oktoj Sinsekvaj**; (b) **Kvintoj** aŭ **Oktoj kaŝitaj** (alirataj per simila movo en eksteraj voĉoj); (c) **Sinsekvaj kvartoj** inter baso kaj supera voĉo; (d) **Falsa Rilato** (noto kaj ĝia kromata modifo (ekz., E♭, E♮) ĉe sinsekvaj akordoj sed en malsama voĉo).

PERSISTOJ, RIPETOJ

**Pedala noto** (mallonge: **pedalo**) (**Persista noto, persisto**) estas noto (kutime en la baso) persistanta tra div. harmonioj. Ĉe meza voĉo ĝi estas pedalo **interna**; ĉe la plej alta voĉo ĝi estas pedalo **invertita.**

Laŭ sia skalnoto pedalo nomiĝas **pedalo tonika** (**dominanta, medianta** . . .) [**Doh- (Soh-, Me-) pedalo**].

Du pedalnotoj kune (plej ofte tonika kaj dominanta) estas **pedalo duopa.**

**Burda baso** estas pedalo tonika aŭ dominanta (aŭ **ambaŭ**) persistanta(j) tra la tuta peco.

Noto al kiu oni konstante revenas (de supre aŭ malsupre) estas **noto pivota.**

Povas okazi **persista**(**ripeta**) **ritmo** kun notoj malsamaj.



**Baso Ripeta** (**Obstina**) estas mallonga temo en la baso, konstante ripetata, kun div. melodiaj aŭ harmoniaj akompanaĵoj supre.

***Sekvenco**=almenaŭ dufoja ripeto de figuro, ĉiufoje pli (mal)alte. Ĝi povas esti **suprena, malsuprena**; **harmonia, melodia**; **tonala (laŭgama), vera (absoluta), miksita.**

KROMNOTOJ (NOTOJ NEESENCAJ, EKSTERAKORDAJ)

Kromnoto povas esti **diatona** aŭ **kromata**; **konsonanca** aŭ **disonanca**; **preparata** aŭ **senprepara**; **paŝe** aŭ **salte alirata.** Ĝia sekvo aŭ solvo povas esti **suprena** aŭ **malsuprena**; **prokrastata, interrompata,** aŭ **transdonata** al alia voĉo.

KROMNOTOJ NEAKCENTATAJ (SENAKCENTAJ)

(*t.e., sur dua duono de pulso, aŭ sur pulso malforta*)

(a) **Pasnoto** (per oblikva movo, paŝo (mal)supren. ⟨|d .*r* :m⟩ ⟨|m .*r* :d⟩.

(b) **Pasnotoj kontinuaj** (**samdirektaj**). ⟨|s :*l* .*t* |d'⟩.

(c) **Ondnoto** (pasnoto revena). ⟨|d .*r* :d⟩ ⟨|r .*d* :r⟩.

(d) **Pendnoto** (sekvata de salto (mal)supren. ⟨|f .*m* :s⟩ ⟨|f .*s* :m⟩.

(e) **Anticipo** (noto anticipa). ⟨|f .*m* :m⟩.

(f) **Onda anticipo** ⟨|d :*r* .*m* |r⟩ ⟨|f :*m* .*r* |m⟩.

KROMNOTOJ AKCENTATAJ (*sur pulso forta*) (—"Apoĝaturoj")

(a) **Pasnoto** (per oblikva movo).

(b) **Suspendo (Reteno).**

(c) **Senprepara** (salte alirata).

(d) **Onda.**

(e) **Ŝanĝnotoj** [aparta formo de (c) kaj (d)]. ⟨|m .*f* :*r* .m⟩ ⟨|m .*r* :*f* .m⟩.

## KONTRAPUNKTO

**Kontrapunkto**=la arto kombini melodiojn: al donita melodio (temo: "*Canto Fermo*") aldoni alia(j)n, supre aŭ sube. Kontrapunkto povas esti **strikta** aŭ **libera.** Ekzistas kvin specoj:

**Unua speco**: noto kontraŭ noto.

**Dua speco**: 2 (aŭ 3) notoj kontraŭ 1.

**Tria speco**: 4 (aŭ 6) kontraŭ 1.

**Kvara speco** : 2 (aŭ 3) kontraŭ 1, kun sinkopado.

**Kvina speco** : miksaĵo el la 2a, 3a, kaj 4a. Se tre libera, ĝi nomiĝas **ornama.**

**Kombinata kontrapunkto** = pluraj specoj en div. voĉoj samtempe. **Invertebla k.** = voĉoj supra kaj suba povas interŝanĝi lokon. **Duobla k.** = duvoĉa invertebla. **Triobla k.** = 3 melodioj, el kiuj ĉiu povas esti en supra, meza, aŭ suba voĉo (6 eblaj aranĝoj). **Kvarobla k.** = 4 melodioj (24 eblaj aranĝoj).

La inverto povas esti je la 8to, 10to, 11to, 12to . . . Plej ofta estas inverto je la 8to aŭ la 15to.

KANONO

***Kanono** estas muzikaĵo, en kiu temo anoncita de unu voĉo estas imitata strikte de alia. La **unua voĉo** estas nomebla la **kondukanto** ; la **dua voĉo**, la **sekvanto.** La imito povas esti je la unisono, aŭ je iu ajn alia intervalo sube aŭ supre.

Kanono **senfina** estas ripetebla senfine.

Kanono **kunfina** havas difinitan finlokon.

**Kanono 2 en 1** : du voĉoj (partoprenas) en unu temo.

**Kanono 4 en 2** : 4 voĉoj, 2 temoj.

*Rondkanto* estas senfina kanono je la unisono. *"Non Nobis"* (Byrd) estas k. senfina, 3 en 1, je la 4to kaj la **8to.**

**Kanono inversa** : ĉiu suprena intervalo en la unua voĉo estas malsuprena en la dua, kaj inverse. **K. inversakcenta** : *"per Arsin et Thesin"*. **K.** (**mal**)**longiga** : imitas la temon per notoj pli (mal)longaj. **K. sekvenca** (**ronda**) : kies ĉiu ripeto estas en malsama tonalo, ĝis reveno al la originala. **Retrokanono** (*"cancrizans"*) ; la dua voĉo komencas ĉe la fino- kaj retroiras al la komenco. **Kanona imitado** : libera kanoneca verkado.

FUGO

Kontrapunkta verko, en kiu **Subjekto** prezentita de unu voĉo ripetiĝas de aliaj voĉoj laŭ difinita maniero. Fugo **duvoĉa** (**trivoĉa**), por 2(3) voĉoj.

Post la Subjekto sonas en alia voĉo la **Respondo** (ripeto de la S, sed kutime en dominanta tonalo). Se la ripeto estas senŝanĝa, la R. estas **strikta** (**vera**). Ordinare, tamen, oni faras en la R. ŝanĝetojn : kvinto (d-s) fariĝas kvarto (s-d'), kaj inverse. Respondo tiel modifita = respondo **tonala,** kaj la **fugo estas** fugo **tonala.**



La melodio en la unua voĉo, kiu akompanas la Respondon **en** la dua, estas la **kontraŭsubjekto.**

**La Anonca Sekcio** = la **anonco** de S kaj R per ĉiuj voĉoj laŭvice.

**Kunligaĵo** (**junto**) estas pasaĵeto inter S kaj R, aŭ inter R kaj S.

En ebla **Dua Anonco** (**Kromanonco**) ĉiuj voĉoj ripetas la S kaj R laŭ aranĝo nova.

Sekvas **Ellabora Sekcio** (**Meza Sekcio**), kiu diversmaniere ellaboras la S-on ; kaj **Fina Sekcio,** ofte kun **Anonco Fina,** kaj **tre** ofte kun Pedalnoto.

**Epizodo** estas pasaĵo inter anoncoj. Ĝi ne enhavas S aŭ R, sed povas utiligi materialon el ili.

***Streto** (**Kuntiraĵo**) = pasaĵo kun eniroj **kunpremitaj** (dua voĉo komencas kanti la S aŭ R, antaŭ ol la unua finis).

Fugo povas havi plurajn subjektojn. Fugo kun du subjektoj (la **ĉefa** kaj la **dua**) estas **fugo duobla** (**dusubjekta**). Simile : **Fugo triobla** (**trisubjekta**).

Muzikaĵo, kiu ne estas fugo, nek eĉ **fugeto,** povas tamen esti **fugeca** (I. *fugato*).

MUZIKOSPECOJ

Kutime oni parolas pri muziko kiel **voĉa, instrumenta, ĉambra, absoluta** (**pura**), **priskriba, religia,** aŭ **teatra.** La terminoj ne estas reciproke elbaraj. Ekz., peco povas esti samtempe religia, priskriba, kaj instrumenta. La termino **ĉambra muziko** signifas seriozintencan muzikon por pluraj soloinstrumentoj.

## MUZIKO POR PLURAJ MUZIKANTOJ

Aldonante la silabon **tet** al la numeraloj, oni ricevas la serion ***unuteto, *duteto, *triteto, kvarteto, kvinteto, *sesteto, septeto, *okteto, *naŭteto,** kun signifo (a) Muzikaĵo konsistanta el la dirita nombro da partoj, aŭ por la dirita nombro da ludantoj ; (b) la ludantoj mem. Ekz., **kvarteto** = muzikaĵo kvarparta, aŭ por kvar ludantoj ; aro da kvar ludantoj aŭ kantistoj. (Vidu ankaŭ ĉe "sonata formo" sube).

Ni rekomendas ĉi tiujn terminojn. Tamen la alternativoj ***soloo** (= **solaĵo, solkanto, solludo**) kaj **dueto** (= *unuteto, duteto*) ŝajnas preferindaj pro sia internacieco. Eble ankaŭ **terceto** (= *triteto*).

## MUZIKA FORMO

Terminoj nacilingvaj estas en plena ĥaoso. Ni diros nur, ke ĝenerale, de plej eta ĝis plej longa muzikeroj, oni progresas de **figuro** aŭ **temero** (la plej mallonga), ĝis **duonfrazero, frazero** (kun kadenco neperfekta), **frazo** (kun kadenco perfekta), **sekcio, movimento** . . . Diskuton kaj pluan precizigon ni rezignas ĉi tie.

Laŭ formo (strukturo) muzikaĵoj estas ĝenerale klaseblaj jene :

(a) **Simpla Duera (duparta, dusekcia) Formo.**
(b) **Simpla Triera (triparta, trisekcia) Formo.**
(c) **Sonata Formo** (derivita el (a), sed vere varianto de **(b)**.
(d) **Rondela Formo** (**Rondo-Formo**). Ellaboraĵo de (b).
(e) **Temo kun Variaĵoj.**
(f) **Fugo.**

SONATA FORMO

I *Anonca Sekcio*
- A Unua (Ĉefa) Subjekto (tonika tonalo). Kunligaĵo.
- B Dua (Flanka) Subjekto (alia t.). Eble kun Finaĵeto. Duobla Streko.

II *Ellabora Sekcio*
- Libera kaj diverstonala. (Ofte kun nova materialo).

III *Resuma Sekcio*
- A² Unua Subjekto (tonika t.)
- B² Dua Subjekto (tonika t.)

Ofte, ĉe verko granda, sekvas Kvara Sekcio aŭ Finaĵo.

**Sonato** havas plurajn ***movimentojn** (partojn kompletajn en si), el kiuj kutime almenaŭ unu (plej ofte la unua) estas en "sonata formo".

La vortoj **Triteto, Kvarteto** . . . (p. 35) ankaŭ = verko sonateca por 3, 4 . . . instrumentoj.

**Simfonio** = verko sonateca por orkestro.

**Konĉerto** nun ĝenerale = verko sonateca por orkestro kun soloinstrumento (ofte kun ***kadenzo** (= solopasaĵo koloratura) aŭ kadenzoj).

RONDELA FORMO

A B A C A (D A)

SONATRONDELA FORMO

I *Anonca Sekcio*
- A Unua Subjekto (tonika tonalo)
- B Dua Subjekto (alia t.)
- A² Unua Subjekto (tonika t.)



II *Epizodo* (eble kun ellaboro moduliĝema, **kun aŭ sen** nova materialo)

III *Resuma Sekcio*
- A³ Unua Subjekto (tonika t.)
- B² Dua Subjekto (tonika t.)
- A⁴ Unua Subjekto (aŭ finaĵo kun aludoj al ĝi)

MUZIKO RELIGIA, LITURGIA

***Antemo** (*anthem*). Angla ekvivalento de moteto : kutime kun vortoj Bibliaj. Apenaŭ konata ekster landoj Anglalingvaj.

**Antifono.** Verso aŭ frazo kantata post aŭ antaŭ psalmo aŭ kantiko. **Antifona kantado** : Du ĥorflankoj (**kantora** kaj **dekana**) kantas alterne.

**Ĉanto** (*Chant*). Formo de kantado por psalmoj kaj kantikoj. **Ĉ. Gregoria** (**plejnkanto**) estas modala : ofte skribita per ***neumoj. Ĉ. Anglikana** havas sekciojn alterne 3- kaj 4-mezurajn, kiuj komenciĝas per **recita noto** kaj finiĝas per kadenco. Ĝi povas esti **simpla, duobla, triobla** . . . (Vd. "*Himnaro Esperanta*").

**Himno.** komuna kanto religia, ordinare plurstrofa.

**Ĥoralo.** Malrapida himno de la Germana tipo.

***Intoni.** Deklamkanti pli-malpli unutone.

**Kantato.** Ĥora verko, kutime sed ne ĉiam religia ; simila al oratorio, sed ĝenerale pli mallonga kaj senpretenda.

**Kantiko.** Liturgia himno (alia ol psalmo). Ekz., *Magnificat, Te Deum.* **Kantikaro** ("*Service*").

***Karolo.** Ĝoja popolkanto kun karaktero **sezona** kaj kutime religia : aparte Kristnaska aŭ Paska. (*Carol*).

**Meso.** Romkatolika eŭkaristia Diservo (Sekcioj : *Kyrie, Gloria* . . .)

**Moteto.** Praantemo en kontrapunkta stilo.

**Ofertorio.** (a) Antifono post la *Kredo.* (b) Muzikaĵo ludata dum la monkolekto.

**Oratorio.** Verko kutime religia, analoga al opero, sed sen agado, scenaĵo, aŭ kostumo.

**Rekviemo.** (a) Meso por la mortintoj. (b) Muzikaĵo memoriga pri mortinto.

ALIA MUZIKO VOĈA

**Kanto** = muzikaĵo por voĉo(j), kun aŭ sen akompanaĵo.

Kanto *aŭtuna, batala, boata, ĉasa, edziĝa, humora, infana, laborista, lerneja, lula, Maja, malena, nokta, printempa, religia, studenta, trinka, triumfa, vagabonda, vespera* . . .

**Kanzono** = solokanteto, ofte kun **rekantaĵo** (**refreno**) fine de strofo.

**Popolkanto.** Tradicia kanto de la popolo: **cigana, folklora, mara, nacia, negra** . . .

**Partkanto.** Kanto plurvoĉa, kontrapunkta aŭ ne, ĝenerale senakompana. Madrigalo, moteto, glio, estas specifaj formoj.

**Madrigalo.** Partkanto kontrapunkta. Sekulara moteto.

***Glio** (*glee*). Angla kantformo por viraj solovoĉoj.

**Recitativo.** Kantaĵo deklameca por solovoĉo.

**Rondkanto** (**ĉenkanto**) (*round*). Senakompana voĉa kanono je la unisono. **Rondkanto humora** (**vortluda**) (*catch*).

ALIA INSTRUMENTA MUZIKO

Oni parolas pri **verko, muzikaĵo, komponaĵo, peco muzika.** Ekzistas multaj formoj kun div. nomoj: uzeblaj ĉar internaciaj, klaraj, aŭ akceptitaj. Kiomgrade oni preferu apartan radikon, aŭ komunlingvan ekvivalenton, decidos nur estonta uzado. Ekz.,

**Albumfolio, Antaŭludo (Preludo), Arabesko, Aŭbado** (**Tagiĝmuziko**), **Balado** (laŭ signifo internacia), **Barkarolo, Ĉakono, Elegio, Etudo, Fantazio, Humoresko, Idilio, Improvizaĵo, Interludo, Kanto Senvorta, Kaprico, Lamento, Nokturno** (**Nokta Muziko**), **Pastoralo, Postludo, Rapsodio, Serenado, Skerco, Sonpoemo, Tokato, Uverturo** . . .

**Fanfaro.** Gaja pasaĵo por latunaj instrumentoj.

**Kvodlibeto.** Kunmetaĵo el melodi(er)oj diversaj, ludataj aŭ (a) unu post la alia (*musical switch*) aŭ (b) kune.

***Sŭito.** Dancaro, (kutime pecoj samtonikaj) Pecaro.

MUZIKO DANCA

La nomo de danco estas uzebla por muzikaĵo samstila: la samaj rimarkoj validas. Ekz.,

**Bolero, bureo, ĉardaso, dupaŝo, fandango, farandolo, gajlardo, galopo, gavoto, gopako, ĝigo, mazurko, menueto, pavano, polko, polonezo, redovo, rigadono, rilo, saltarelo, sarabando, stratspeo, tango, tarantelo, trepako, valso** . . .

Ekzistas multaj aliaj dancoj lokaj aŭ antikvaj, kies nomojn oni facile trovos laŭbezone, aŭ faros per loknomo: **Danco Havana, Sicilia, Stiria, Varsovia** . . .



MUZIKO TEATRA

**Opero.** Muzika dramo kun **aktoj** kaj **scenoj**. **Opereto.**

**Baleto.** Teatra dancaro kun muziko kaj mimiko.

## INSTRUMENTOJ

### (I) KORDINSTRUMENTOJ

(A) KORDOJ FROTATAJ

(*a*) *Per arĉo*

**Vjolo** (*viol*). Praviolono 5-korda, platdorsa, multspeca.

**Guzlo.** Slava violono unukorda.

*Violona Familio.* **Violono, Aldviolono, Violonĉelo, Kontrabaso** (**basviolono**). (Mallonge: **Violono, Aldo, Ĉelo, Baso**).

(*b*) *Per rado*

**Gurdo** (*hurdy-gurdy*).

(B) KORDOJ *PLUKATAJ (TIRATAJ)

(*a*) *Per fingroj, ungoj, aŭ plektro*

(i) *Harpa Familio*

**Liro.** Antikva harpeto plektre ludata.

**Harpo. Kimra h.** (3 kordvicoj, okto 17-korda). **"Kromata" h.** de Pleyel (okto 12-korda). **Pedala h.** (la kutima): **unu-** aŭ **du-mova.**

**Psaltero.** Prazitero plektre aŭ fingre ludata.

***Zitero** (*Zither*). 30-45-korda instr. kun korpo (sonskatolo) kvarflanka (ofte kvadrata); ofte kun 4-6 apartaj kordoj super fretplato unuflanke por la melodio. (Ŝajne G. *Zither* = (a) **zitero,** (b) **citro** (vidu sube).

**Harpzitero (Akordzitero).** (*Autoharp*).

(ii) *Korpo duonpira: kun †fretoj*

**Liuto.** Multaj specoj, plejparte mortintaj: **Mandoro** (liuteto), **Teorbo** (basliuto) . . .

*Mandola familio.* Korpo liuteca, plejofte kun 4 kordparoj.

**Mandolineto. Mandolino (Napola)** (la plej ofta). **Mandolino Milana.** ***Mandolo** [**Ĉela** (**violonĉele kordata**), **Tenora, Subokta, Basa**].

---

† **Freto** (*Fret/touche/taste/Bund*); etimologie = fer-eto.

(iii) *Platdorsa kun ligna korpo : kun fretoj*

**Mandolino platdorsa** (citra mandolino).

**Citro** (*Cither : It. cetera*). Kun 4-6 kordoj aŭ kordparoj. Multaj nomoj kaj formoj (plejparte mortintaj). **Pracitro** (*cittern*). **Hispana c.** (**bandurio**). **Angla** (aŭ **Portugala**) **c.** (5 kordparoj).

*Gitara Familio.* **Pragitaro** (*Gittern*). **Rusa g.** (7-korda). **Hispana g.** (klasika), 6-korda, fingre aŭ ungo ludata. **Plektra g.**, moderna, metalkorda, plektre ludata. **Havaja g.** (**Ŝtalgitaro**) : kordoj levitaj, premitaj per "ŝtalo", ludataj per artefaritaj "ungoj". **Elektra g.**, Havaja gitaro sen sonskatolo, elektre sonigata. **Ukulelo** : Havaja gitareto 4-korda.

**Balalajko** : Rusa 3-korda instr., korpo triangula. 5 grandoj.

**Domro** : Rusa mandolineca instr., korpo duonsfera. 5 grandoj.

(iv) *Platdorsa kun sontabulo el streĉita pergameno*

*Banĝa Familio.* Kun fretoj. Ludataj fingre aŭ plektre. **Banĝeto.** **G-banĝo** (plej ofta). **B. Tenora, Kontrabasa, Basa.** **Banĝulelo** : banĝa korpeto, ukulele kordata. **Banĝolino** simila, sed mandoline kordata. **Citra banĝo**, plektre ludata.

(b) *Per klavara meĥanismo*

**Spineto.**

**Klavceno** (*Harpsichord*).

(c) KORDOJ FRAPATAJ

(a) *Per martelo*

***Zimbalono** (*Dulcimer*) (Hung. *Czimbalom, Zimbalon*, k.a.)

(b) *Per klavara meĥanismo*

***Klavikordo.**

**Fortepiano** (Mallonge : **Piano**).

(D) KORDOJ BLOVATAJ

**Eola Harpo** (**Ventharpo**).

## (II) BLOVINSTRUMENTOJ

(Klaseblaj kiel (i) **Lignaj** (inkl. fluto) : (ii) **Latunaj**)
(Multaj variantoj kun multaj nomoj. Ni citas nur la pli oftajn).

(A) FLUTA FAMILIO

(a) *Kun buŝtruo flanka*

**Fluto.** **Fluteto** (**Okta fluto**). **Fifro** (B♭ fluteto). Diversaj **Basflutoj.**



(b) *Kun buŝtruo fina* (*Flutoj Buŝpecaj*) (*Recorder Family*)

**Bekfluto (primitiva)** (*Recorder*).

**Flaĝoleto.**

(*Kun ses truoj samliniaj*).

**Bekfluto lerneja** (*School Recorder, Stockflöte, Schulflöte*).

**Ladfluto** (**Metala bekfluto**) (*Tin whistle*).

B) ANĈINSTRUMENTOJ

(a) *Klarneta Familio* (Tubo cilindra, anĉo unuopa)

**Klarnetoj** (en **C, B♭, A**). Aliaj : **Alta** (**E♭, F**) ; **Basetkorno** (**Tenora**), **Basa, Kontrabasa.**

(b) *Saksofona Familio*

**Saksofonoj.** 12 specoj.

(c) *Hoboja Familio* (Tubo konusa, anĉo duopa)

**Hobojo.** **Aldhobojo** (ofte nomata **Angla Korno**).

**E♭ h.** **Baritona h.** (**Hekelfono**). **A h.** (**"H de amo"**)

**Fagoto.** **Kontrafagoto.** **Sarusofono** (6 grandoj).

**Ŝalmo.** Primitiva anĉinstrumento (prahobojo, praklarneto).

(d) *Sakŝalma Familio*

**Sakŝalmo** (**Sakfajfilo**). Multaj specoj : **Nordangla, Skota, Irlanda, Franca** (**Kornemuzo, Muzeto** . . .)

(C) KUN BUŜPECO

(a) *Trombona Familio*

**Trombonoj** : **Alda** (mortinta) ; **Tenora, Basa, Kontrabasa, Tenorbasa** (=B♭ t., basa diametro, tenora longo).

(b) *Korna Familio*

**Korno.** La "Valva" ("kromata") korno de la orkestro.

**Korno Natura** (senvalva).

**Ĉaskorno** (Vorto literatura).

**Alpa Korno** (7-12-futa).

(c) **Klariono** (**Signalkorno**) (*Bugle*)

Tubo korna, buŝpeco kaj kloŝo trumpetaj.

*(d) Trumpeta Familio*

**Trumpeto** (Valva, "Kromata").

**Trumpeto Natura** (Senvalva). Kun aŭ sen kromtuboj.

**Bastrumpeto** (**Valvtrombono**).

**Glita Trumpeto.**

**(e) Korneto**

*(f) Ofiklejda Familio*

**Ofiklejdo, Serpento** (multaj instrumentoj mortintaj).

*(g) Sakskorna Familio*

**Sakskornoj** kaj **Flugelkornoj.** Multaj similaj instrumentoj klarionidaj: tubo konusa, buŝpeco tasa (ĉe la fl. la tubo estas iom pli larĝa kaj la kloŝo teniĝas horizontale). Nomoj varias laŭ lando kaj fabrikisto.

*(h) Tubja Familio*

**Tubjo** (*Tuba*) malprecize=iu ajn basa latuninstrumento, alia ol trombono. Ekz., la **Basaj Sakskornoj**; la **Suzafono**; la **Eŭfoniumo** (**Tenora Tubjo**); la **Bombardonoj** (**Bastubjoj**).

(D) PLURSONAJ

*(a) Kun tuboj*

**Orgeno.**

**Orgeno kineja.** Orgeno transregistra kun "efektoj" sonimitaj.

*(b) Sen tuboj (Anĉara Familio)*

***Regalo** (Orgeno "Libra", "Surtabla").

**Harmoniumo.**

**Suĉharmoniumo** (**Suĉorgeno**) (*American* aŭ *Cabinet Organ*).

**Akordiono.** (Kutime kun klavaro).

**Koncertino.** Akordioneto sesangula senklavara.

(**Buŝ**)**Harmoniko** (**Anĉharmoniko, Buŝakordiono**) (*Mouthorgan*).

## (III) PERKUTINSTRUMENTOJ (FRAPATAJ)

(A) TAMBURA FAMILIO

**Tenora tamburo.**

**Milita** (**koksa**) **tamburo.**

**Bastamburo** (**tamburego**).



**Timpanoj** (*Kettledrums/Pauken*). Agordeblaj.

**Tamtamo** (*Tom-tom*). Hinda kaj Ĉina tamburo. Agordebla aŭ ne. Trovebla ankaŭ en dancbandoj. (Vidu *Gongo*).

**Tamburino** (*Tambourine/Schellentrommel, Handtrommel*). Kun tintiloj.

***Taboro** (*Tabor, taboret*). Tambureto sen tintiloj.

(B) ALIAJ

*(a) Kun sono preciza*

*(i) Sonorila Familio*

**Sonorilaro.** Ekz., de preĝejo (Vd. *Tubsonoriloj*).

***Karilono.** Sonorilaro ludata klavare, aŭ (ĉe horanonco) meĥanike.

**Mansonoriloj.** Svingataj mane.

*(ii) Marimba (Perkutharmonika) Familio*

***Marimbo.** Primitiva ksilofono. Instrumento el objektoj (kun aŭ sen resonanciloj) skale arangitaj, kiujn oni frapas. **M. ligna** (*Kaffir piano*), **ŝtona, kukurba, nuksoŝela, eĉ krania!** Sed la vorto nun aplikiĝas ankaŭ al instrumentoj modernaj kaj luksaj.

**Ksilofono** (**Ligna harmoniko**).† Moderna ligna marimbo.

**Gongaro** (**marimbaj gongoj**).

**Tubsonoriloj.** La "sonoriloj" de la orkestro.

***Kampaneto** (**Ŝtalharmoniko**).† (*Glockenspiel/Jeu de clochettes (timbres)/Campanetta*). Variantoj:

**Kampaneto vitra.** Kun vitraj lamenoj.

**Tubofono.** Kun tuboj kaj klavaro.

**Vibrafono.** Elektra.

**Celesto** (*Celesta*). Ŝtalaj lamenoj kun klavaro, kvazaŭ pianeto. (Ŝajne F. *Celeste*=(a) celesto, (b) kampaneto, (c) tipofono).

**Tipofono** (**Dulcitono**) (*Gabelklavier*). Celesto kun tonforkoj.

**Glasaro** (**Muzikaj Glasoj, Glasharmoniko**).† Fingre frotata.

**Klavara Glasaro.** Varianto kun klavara meĥanismo.

† La radiko **harmonik** Itale=nur (a) *Glasharmoniko* (Glasaro); en FG, ankaŭ (b) *Perkutharmoniko*=iu ajn instrumento kun lamenoj, tabuletoj, k.s., kun aŭ sen klavaro; ankaŭ (c) *Anĉharmoniko*=akordiono mana aŭ buŝa. Pro ĝisnuna uzado ni akceptis tiun vastan signifon. Tamen ŝajnus preferinde uzi **harmoniko** nur por buŝharmoniko, kaj por (b) uzi **marimbo**, aŭ radikojn sendependajn.

### (b) *Kun sono malpreciza*

**Triangulo.**

**Kastanjetoj.**

**Cimbaloj** (*Cymbals/Cymbales/Piatti, cinelli/Becken*).

**Gongo** (*Gong*). Sonora metala diskego. (FIG *tam-tam* = (a) tamtamo, (b) gongo).

**Tintilaro** (**Tintiloj, Sledsonoriloj**).

**Amboso, Klakiloj,** k.m.a. bruiloj (precipe ĉe ĵazbando).

### (IV) INSTRUMENTOJ OKAZAJ AŬ LUDILAJ

**Zumfero.** Misnomata "judharpo".

**Kukolo, Najtingalo, Koturno, Okarino, Panfluto, Najlviolono, Muzika segilo, Mirlitono** (*kazoo*), k.a. instrumentoj infanaj, aŭ por speciala efekto.

### (V) INSTRUMENTOJ MEĤANIKAJ AŬ AŬTOMATAJ

***Orkestriono.** Meĥanika instrumento imitanta orkestron. **O. vapora,** *steam-organ.*

**Stratpiano** (**Pianogurdo**).

**Pianolo** (**Aŭtopiano**).

**Fonografo. Gramofono.**

**Muzika Skatolo** (**Pinglogurdeto**).

**Elektrofono** (Elektrotona "orgeno"), kaj aliaj elektraj **instrumentoj** nun eksperimentataj.

### DAMPADO

***Dampi** (*to damp, mute/étouffer/dämpfen*) = mane aŭ ile malpliigi vibradon, aŭ ŝanĝi sonkvaliton sufoke aŭ obtuzige. Nuancoj : **malplilaŭtigi** ; **obtuzigi** (modifi la tembron aŭ klarecon de tono ; *muffle, deaden, dull*) ; eĉ **mutigi** (**silentigi**) = *plendampi.*

Ĉe violono, korno, k.s., oni mallaŭtigas la sonon kaj modifas la tembron per **dampilo** (aŭ **sordino**). Ĉe la harpo oni mutigas la kordojn per man- aŭ fingropremo, por ricevi **sonon "dampitan"** (*étouffé/gedämpft*). Ĉe harpzitero dampaj klavoj mutigas kordojn nebezonatajn. Oni dampas tamburon mutige (per manpremo), aŭ obtuzige (per uzo de mola frapilo), aŭ (ĉe tamburo milita) (interalie) per tuko aŭ kojno inter ŝnuroj kaj membrano. Ĉe la piano, **dampilo** (aŭ pli precize **mutigilo**) (*damper/étouffoir/sordino/dämpfer*) senvibrigas la kordon ĉe leviĝo de la klavo, aŭ de la dekstra pedalo.



## INSTRUMENTOPARTOJ

### VIOLONO (kaj iom GITARO k.s.)

La **korpo** de violono konsistas el **sontabulo** (**sonplato**) kaj **dorso** iom ŝvelaj, kunigitaj per **ripoj** (**flankoj**), kaj ankaŭ per internaj **blokoj,** kiuj tenas respektive la (**fin**)**butonon** kaj la **kolon.** Korpmeze estas la **talio,** kies **anguloj** ankaŭ subteniĝas per blokoj. Fine de la kolo estas la **kapo** ; kiu enhavas la **kejltruojn** kaj la **voluton** (**spiralon**).

En la tabulo estas **sontruoj** (ronda ĉe gitaro, **"f-truoj"** ĉe violono). Surtabule inter la truoj metiĝas **ponto.** Inter la tabulo kaj la dorso (sub la pontpiedo sub la plej alta kordo) troviĝas movebla **sonfosto,** kaj sub la basa pontpiedo estas gluita **basa strio.**

En la kapo estas agordaj **kejloj** (ĉe la gitaro troviĝas dentrada meĥanismo). Sur la kolo estas **fingroplato** (ĉe gitaro sur la fingroplato aŭ **fretplato** estas **fretoj**). Ligita al la butono per katgota **ŝnuro** estas la **korda tenilo** (**finpeco**), de kiu la kordoj etendiĝas ĝis la kejloj, kuŝante kapfine sur **selo** kaj alifine sur la ponto.

La fingroj mallongigas la kordojn per **premo** : iufoje **per premo du-, tri-,** aŭ **kvarkorda.** Gitaristo povas premi la montran fingron samtempe sur ĉiujn 6 kordojn (t.e. **baro**), aŭ sur 2, 3, aŭ 4 (**bareto**), kaj uzi ***kapotaston,** por seligi **iun** freton portempe.

Fine de ĉelo aŭ baso estas **piedo** (**pikilo**). Sur violono aŭ aldo kutime troviĝas **mentonapogilo.**

La **arĉo** konsistas el ĉeval**haroj** strečitaj de **pinto** ĝis **tenilo** (**kalkano**) de ligna **stango.** La tenilo konsistas el **bloketo** kaj **ŝraŭbo.**

Diversaj efektoj produktiĝas per uzo de harmonoj, plukado, dampado, kaj diversspeca **arĉado.**

### PIANO

Piano povas esti **horizontala** aŭ **vertikala.** Premo de **klavo** (**blanka** aŭ **nigra**) igas **martelon** frapi la kordojn. Kutime estas du **pedaloj** : la **dekstra** (**subtena**) kaj la **maldekstra** (**mallaŭta**). La dekstra pedalo levas ĉiujn mutigilojn de la instrumento, tiel, ke la kordoj jam sonantaj daŭre sonas, kaj samtempe multaj aliaj kordoj vibras resonance. La maldekstra pedalo malfortigas la sonon (a) per frapo **unukorda** ; (b) per frapo pli mallonga (do pli malforta) ; (c) (ĉe pianoj duagradaj) obtuzige, per meto de dampa felto inter martelon kaj kordon.

Piano **kruckorda** havas kordojn transversajn (do pli longajn).

BLOVINSTRUMENTOJ

Unufine estas la **bušpeco,** kun formo **beka** (*klarneto*), **tasa** (*trumpeto, trombono*), aŭ **funela** (*korno*). Alifine estas funelforma **kloŝo.**

**Kromtubo** estas tubo plilongiga aŭ kuniga. Ĉe trombono oni aliigas la piĉon per **glita tubo** (glitpeco).

**Valvaparatoj.** Ĉe fluto aŭ klarneto premo de **klavo** levas **klapon** super **truo**: ĉe korneto aŭ trumpeto oni premas **piŝton.**

ANĈOJ

Anĉo povas esti **libera** (*anĉara familio*, p. 42), aŭ **batanta** (vibranta kontraŭ aerfendo). Anĉo batanta povas esti **simpla** (**unuopa**) (*klarneto, saksofono*) aŭ **duopa** (*hobojo, fagoto*).

ORGENO

Orgeno faras sonojn per **tuboj** aranĝitaj en **vicoj** (**tubaroj**).

*TUBO* povas esti (a) **Buŝtubo** (kies sonilo estas **buŝo** (truo en la antaŭo), (b) **Anĉtubo** (kun anĉa sonilo). Buŝtubo povas esti **ŝtopita** supre, aŭ **neŝtopita.**

*Ĉe buŝtubo* la *piĉo* dependas de ĝia longo; la *tembro*, de ĝia proporcio (larĝo al longo), **buŝformo,** materialo, aerpremo, kaj ĉu ĝi estas ŝtopita aŭ ne.

*Ĉe anĉtubo* la *piĉo* dependas de la grando de la anĉo; la *tembro*, de la formo kaj grando de la tubkorpo, kaj la formo, diko, risorteco, kaj kurbeco, de la anĉo.

*VICO* estas aro da samspecaj tuboj (po unu por ĉiu klavo) starantaj sur **ventkesto.** Kvazaŭ aparta muzikilo, ĝi havas propran tembron. Oni (**mal**)**ludebligas** ĝin per (**tir**)**anso** aŭ per (**vic**)**klavo.** Vicoj grupiĝas laŭ **Familioj.** *Buŝtubaj Familioj:* **Principaloj** (*diapasons*), **Ŝtopitoj, Flutoj, Violonoj,** k.a. *Anĉtubaj Familioj:* **Trumpetoj, Hobojoj, Klarnetoj,** k.a. Oni povas rapide ŝanĝi vickombinojn per **kombinpedaloj** aŭ **kombinopiŝtoj** (**piedpiŝtoj** aŭ **manpiŝtoj**).

Piĉe la vicoj grupiĝas en **registroj** (**8-futa, 4-futa, 16-futa . . .**) **8-futa** signifas, ke la registro estas sampiĉa kiel ĉe klavaro piana. **Sub-** aŭ **okto-** prefikse indikas registron okton sub aŭ super la ordinara (Ekz., **Subprincipalo 16, Oktofluto 2**).



Ĉiu *KLAVARO* regas apartan grupon da vicoj, nome **sekcio,** kiu estas kvazaŭ orgeno en si mem. La klavaroj (kaj same la sekcioj) kutime nomiĝas laŭorde, de la plej proksima: **Ĥora, Ĉefa, Ŝvela, Soloa, Eĥa** (aŭ III, I, II, IV, V); kaj eble **Bombarda** (por laŭtegaj vicoj). Ĉe orgeno duklavara: **Ĉefa, Ŝvela** (aŭ I, II). Troviĝas ankaŭ **pieda klavaro** por **Pedala Sekcio.** Oni povus ankaŭ nomi ĝin **pedalaro,** sed tiu vorto ampleksus ankaŭ la kreŝendpedalojn.

*SEKCIO* povas esti (kiel Ĉefsekcio) **neenfermita,** aŭ (kiel Ŝvelsekcio) **enfermita** en granda **ŝranko** kun **fermilaro. Kreŝendpedalo** movas la fermilaron kaj ebligas (mal)kreŝendon. Ekzistas **Ŝvelpedalo, Ĥorpedalo, Solopedalo . . .**

La *MEĤANISMO* povas esti (a) **tira** (per **pivotaĵoj** konektitaj per **tirvergoj** kaj **puŝstangoj**; (b) **pneŭmatika** (per vento); (c) **elektr**(**opneŭmatik**)**a** (per elektro kaj vento). La *BLOVMEĤANISMO* povas esti (a) **pumpa,** (per **pumpobalgoj** funkciigitaj mane (per **pumpstango**), aŭ elektre); (b) **ventuma** (per elektra ventumilo).

Por ludi du klavarojn samtempe, oni uzas **kuplilon** funkciigatan per anso aŭ vicklavo. Ekzistas ankaŭ kupliloj **oktaj** kaj **subokt**aj. Ekzemplaj nomoj: **Ŝvelo al Ĉefo, Ŝvelokto,** k.s. Tremefekton oni havigas per anso nomita **Tremilo,** kiu ŝancelas **la** venton.

TERMINOJ DIVERSAJ. **Miksaĵo** aŭ **Harmonaro**: plurvoĉa tubaro soniganta harmonojn de la 8-futa registro. **Vico neunisona**: kies sonoj ne estas unisonaj al la orgenpiĉo: ekz., 12-to. **Plenorgene**: per ĉiuj vicoj. **Memsonado**: persista noto pro meĥanisma difekto. **Orgeno rekt**(**registr**)**a**: havas apartan vicon por ĉiu registro de ĉiu tubspeco. **Orgeno trans**(**registr**)**a** havigas plurajn registrojn el unu vico per transkupliloj. Tubo (**mal**)**larĝa**: kies proporcio estas (mal)larĝa. **Orgenmeblaĵo** (**panelaro** kun **tubmontraĵo**) ĉirkaŭas kaj belaspektigas la instrumenton.

TAMBURO

Frapante la **kapon** de tamburo per **frapilo**(**j**), oni povas produkti aŭ sonon unuopan, aŭ **triladon** (**tremfrapadon**). La milita tamburo havas **vibrokordojn** trans la suba **membrano.**

GRAMOFONO

La gramofono estas sonproduktilo ludata per **nadlo** fiksita sur **diafragmo** fine de **sonbrako,** kiu laŭiras **kanelojn** de **disko**

rondiranta sur **rotacia tablo.** La sono venas el **laŭtparolilo** korn- aŭ kestforma. Ekzistas elektra speco kun **nadla kontakt-brako** (*pick-up*), kies reprodukto sonas per speco de radioaparato kun **dinamika** (elektra) **laŭtparolilo.**

SONA KONSERVO KAJ REPRODUKTO

La ĉefaj modernaj metodoj de sonkonservo estas (a) **Kanelita disko** (por gramofono) ; (b) **Sonbilda strio,** utiliganta lumvariojn (precipe por sonfilmoj) ; (c) **Magnetita drato** (precipe por radiofonio).

## AKCESORAĴOJ

**Agordilo** (Piana, harpa . . .)

**Kalibrilo.** Korda mezurilo.

**Kordo** (**katgota, drata, dratkovrita, silka**). **G-kordo. Kordo libera** (nepremata), **premata.**

**Metronomo.** Rapidmontrilo.

**Piĉiloj.** (a) **Piĉtubo.** (b) **Piĉforko** (**tonforko**).

**Plektro** (**plukilo**). **Plektri,** uzi plektron.

**Rastralo.** Plumo kvinbeka, por skribi liniaron.

**Rezino** (**Kolofono**).

## INSTRURIMEDOJ

**Ritmonomoj** (*time-names*) por ritmofiguroj. Ekz., la figuro  nomiĝas *tafa-tefe.*

**Fingrosignoj** (*finger-signs*) por ritmofiguroj.

**Mansignoj** (*hand-signs*) por skalnotoj, sugestaj pri iliaj **mensaj efektoj.** Per ili oni povas signe dikti duvoĉan partkanton.

***Modulatoro.** Solfaista gamtabelo kaj diktilo. Ĝi bildigas la konstruon kaj interrilaton de intervaloj (diatonaj, kromataj, kaj enharmonaj), skaloj, tonaloj, kaj akordoj.

## VOĈDRESADO

**Voĉo** = (a) muzika sono el la laringo ; (b) individua parto ĉe partkanto aŭ partituro.

*Voĉoj inaj aŭ infanaj :* **Soprana, Mezosoprana, Kontralta.**

*Voĉoj viraj :* **Alda** (falseta, virkontralta), **Tenora, Baritona, Basa.**

**Baso** = (a) basvoĉo ; (b) basaĵo, muziko por basvoĉo ; (c) basulo.



**Mi estas bas(ul)o** = Mi kantas base (la bason, la basan parton), havas basan voĉon. Simile ĉe aliaj voĉoj : **Mi estas soprano . . .**

Oni **dresas** la voĉon per **spir-** kaj **voĉ-ekzercoj.** Estas kutime paroli pri **registroj** de la voĉo (**Brusta, meza, kapa**) (aŭ **Dika** kaj **maldika**)—terminoj eble pli subjektivaj, ol fiziologiaj.

Laŭ kelkaj aŭtoritatoj la **"Granda Rompo** (**Ŝanĝo**)**"** normale situas proksimume je E aŭ F super meza C ; laŭ aliaj ĝi **ne** ekzistas. La vira kapvoĉo estas **falseto.**

**Jodli** : alterni inter kapa kaj brusta registroj. **Zumi** : kanteti subvoĉe, kun buŝo pli-malpli fermita.

Ĉe pubereco, knaba voĉo **ŝanĝiĝas** (**profundiĝas, viriĝas**) (*break*). Ĉe alta noto, voĉo povas **rompiĝi** (*crack/fêler*).

Kantisto devas **teni** (**konservi**) **la piĉon.** Ĥoro senakompana emas **perdi la piĉon** kaj kanti **subpiĉe** : iufoje kantisto emas kanti **superpiĉe.**

## TERMINOJ ORKESTRAJ, ĤORAJ

**Orkestro** = instrument(ist)aro. **O. plena** : kun ĉiuj instrumentoj. Ofte instrumentaro (ne orkestro klasika, kaj aparte blov-instrumenta) nomiĝas **bando. Bando armea, mandolina, ĵaza.**

**Violonoj unuaj, duaj. Ĉefviolonisto.**

**Ĥoro** = kantistaro. **Ĥ. vira, virina, miksita** (gea), **infana. Ĥ. duobla** = (a) por 8 voĉoj ; (b) du ĥoroj por kantado antifona aŭ kontrasta. **Ĥor-aĵo, -ejo, -estro.**

**La kondukisto** (=ĥorestro, orkestrestro) **batas la takton** (**taktas**) per mano aŭ **bastono** (**taktilo**). Oni povas **takti—okonojn,—po du** (en mezuro) ;—fortan pulson per **bato malsuprena.**

**Prov**(ripet)**o. Fina provo.**

## INTERPRETO. TEKNIKO

**Akompan-i, -isto, -ado, -aĵo.**

**Fingrado** = (a) Fingromovoj. (b) Elekto de fingro. (c) Ties signado.

**Frapaĉi** (pianoklavon).

**Frazado.**

**Improviz-i, -ado.**

**Interpreti.**

**Kanti** (**Ludi**)
**Laŭvide.** **Laŭorele.**
**Ĝustagorde.** **Malagorde.**
**Laŭtakte.** **Mistakte.**

**Krucigi** la manojn. Ludi **krucmane.**

**Langi, langado, duobla langado.** **Lipi, lipado, troblovi** (*overblow*) (blovinstrumentoj).

**Pozicio** (de mano sur fingrobreto) (violonfamilio).

***Recitalo.** Koncerto de unu artisto, aŭ de soloisto **kun** akompanisto, k.s.

**Repertuaro.**

**Tuŝo** = (a) Metodo tuŝi (de ludanto).
(b) (Tuŝ)respondo (de instrumento).

**Virtuozo.**

## KOMPONADO

**Komponado** = muzika verkado.

***Harmonizi** (**harmoniigi**) melodion = meti al ĝi harmonion.

**Muzikigi** (tekston) = komponi por ĝi muzikon.

***Orkestri** (muzikaĵon) = aranĝi aŭ komponi ĝin por orkestro.

**Transskribi** (verkon) = (a) **aranĝi** (**adapti**) ĝin por alia(j) voĉo(j) aŭ instrumento(j); (b) **transverki** ĝin en brilan parafrazon.

**Partituro** (**plena, kunpremita, piana, voĉa . . .**) = ĉiuj voĉoj kolektive sur sama paĝo.

## ITALAJ VORTOJ

Multaj Italaj terminoj (aparte vortoj instrukciaj) estas internaciaj. Ekz., *Accelerando, a tempo, cantabile, con espressione, da capo, divisi, lento, marcato, moderato, perdendosi, sostenuto, sotto voce, tutti* . . . Ili uziĝos en Esperanto kursive, kiel internaciaj esprimoj neasimilitaj.

Kiugrade Esperanto asimilu ilin, kaj diru, ekz., **adaĝo, andanto, alegr(et)o, kreŝendo, malkreŝendo** (**diminuendo**), **legate, preste, rubate, stakate,** decidos nur estonta uzado.

Kompreneble, oni rajtas uzi ankaŭ Esperantajn vortojn, kaj diri, ekz., **iom post iom, laŭvole, laŭte, rapide . . .** Eble, kun la paso de tempo, oni pli kaj pli uzos terminojn pure Esperantajn aŭ asimilitajn. Sed nuntempe, pri terminoj pli oftaj, estas



konsilinde uzi la vortojn kaj mallongigojn Italajn, laŭ internacia kutimo, kaj skribi, ekz., **cresc, dim, f, mf, pp, rall, rit,** eĉ se parole oni uzas Esperantan vorton.


## MALLONGIGOJ

Pri *ripetosignoj* (pri notoj, pasaĵoj, vortoj), kaj similaj mallongigoj internacie uzataj, oni konsultu lernolibron.

**Oktavosignoj.**
**8-vo** (**8to**) = okton pli alte, ol skribite.
**8-vo** (**8to**) **sube** = okton pli sube, ol skribite.
**8** (**Kunokte**) = Aldonu okton (pli alte, se la 8 staras supre: pli malalte, se sube).

**M.D.** Mano Dekstra. **M.S.** (aŭ **M.M.**) Mano Maldekstra.


Div. gradoj de stakato (**piko, punkto, punktoj ligitaj**).


Ŝvelsigno (ŝerce: *harpingloj*).


Fermato (daŭriga signo).


Ligaturo (kunliga signo), **kun signifo**

(a) Daŭrigo (*tie, bind*) (ĉe ripeto de sama noto).
(b) Glate, "*legato*" (*slur*), (ĉe notoj malsamaj).
(c) Glite, "*glissando*" "*portamento*".
(d) Sammove (arĉa streko ĉe kordmuziko).
(e) Samspire (blovmuziko).
(f) Samsilabe (voĉmuziko).
(g) Frazamplekso (**frazosigno**).


Triolsigno.

< > Akcentsignoj.

✱ + Enirosigno (ĉe **rondkanto**).

, ✓ Spirosignoj.

o (a) Libera kordo. (**b**) **Harmono.**

∪ aŭ o Kalkano. ∧ Piedpinto. ∧∧ Glitigu (orgeno).

V Puŝo (arĉo suprena) ⊓ Tiro (arĉo malsuprena).

## RECENZO EL 'HEROLDO DE ESPERANTO':

*Unitarismo — realigita Homaranismo.* Kompilita kaj tradukita el la angla de Rüdiger Eichholz. 60 p., 20,5 x 14,8 cm. Prezo 0.75 dol. Eldonis: Esperanto Press, Oakville, Ont., Kanado.

Se mi ion bedaŭras, tio estas, ke la prezo de ĉi tiu broŝuro estas iom alta — ne pro la enhavo, kiu certe valoras pli, sed pro tio, ke mi dezirus al ĝi kiel eble plej grandan disvastiĝon. Mi konfesas, ke malofte mi legis religian broŝuron kun sama intereso kiel ĉi tiun. La pli multaj el niaj gesamideanoj verŝajne suspektas en unitarismo iun sekton. Ankaŭ mi havis tiun suspekton. Sed la malo estas vera. Jen estas religia societo, kies membroj „povas havi diversajn kredojn pri la naturo de Dio, la homo kaj la universo", kaj „ili ĉiuj sin donas al la gardo de persona sincereco, al la kontinua serĉado por vereco per kritika esplorado, al la demokrata metodo en homaj interrilatoj kaj al la sindevigo labori por la pli granda bono de la tuta homaro". Unitaristoj „kredas, ke la mondo, la vivo kaj la homo estas bonaj", kaj pro tio ili povas vivi ne malhelpate kaj evoluigi ĉiujn siajn fortojn. Ili havas kredon, kiu subtenas la vivon. Unitarismo, laŭ la enhavo de ĉi tiu broŝuro, efektive estas speco de homaranismo, kia ĝi vivis en la imago de Zamenhof. Tre simpatia religia movado, ankaŭ — kvankam ĝi ne ĝuste estas nova — tute adaptita al la moderna epoko; movado, sur kies bazo povus unuiĝi ĉiuj sendogmaj di-kreduloj. (Unu demando al la tradukinto: Kion precize signifas „duilionoj da dolaroj"?)

J. v. R.

# TERMINAROJ

reeldonitaj de ESPERANTO PRESS

1. Terminaro por Infanludoj .. .. .. .. .. . S.B.E.T.
2. Radio-Terminaro .. .. .. .. .. .. .. .. A. Venture
3. Muzika Terminaro .. .. . M.C.Butler kaj F.Merrick
4. Kudra kaj Trika Terminaro .. .. . M. kaj V. Verda

Prezo de ĉiu vortareto: po 4 steloj

Mendu ĉe vialanda libroservo aŭ ĉe la eldoninto ESPERANTO PRESS, Oakville, Ontario, Kanado